

Esperantista

REVUO POR ESPERANTO - MOVADO EN ĈSR

Organisace esperantistů.

Zatím se nemůže esperanto šířit jinak než dobrovolnou organizací svých stoupenců. A skutečně dosavadní rozšíření esperanta je výsledkem této organizace. V každé kulturní zemi, kde to veřejná moc nezakázala nebo jiným způsobem tomu nezabránila, je národní svaz k šíření esperanta, jako je náš Svaz esperantistů Československé republiky, jehož nynější stanovy jsou z roku 1937, ale který je pokračovatelem předválečných dvou ústředí Unie a Svazu, založených roku 1908 a přímým nástupcem Svazu československých esperantistů utvořeného r. 1920 z obou původních ústředí. Svaz vznikl původně z činnosti místních spolků, z nichž nejstarší jsou brněnský a pražský klub založené roku 1901 a 1902. Když se pak utvořilo ústředí, bylo ovšem také jedním z jeho úkolů dbáti, aby se i místní organizace zakládaly ve všech významnějších místech. Mělo to úspěch tak dalece, že r. 1938 měli jsme 39 místních odborů. Podle stanov mají se utvořit všude, kde je aspoň 8 členů. Bylo to v těchto místech: Bardějov, Boskovice, Bratislava, Brno, (Klub a TRAKT), Břeclav, Č. Budějovice (Klub, Progreso), Dol. Bousov, Frýdlant n. O., Hluk, Holešov, Hradec Králové, Jaroměř, Josefov, Karvinná, Kolín, Košice, Lázně Bělohrad, Lubná u L., Mladá Boleslav, Mnichov Hradiště, Mor. Ostrava, Nové Zámky, Nový Bohumín, Olomouc, Pardubice, Petřvald ve Sl., Plzeň, Praha, Přerov, Prešov, Příbor, Prostějov, Radvanice, Slezská Ostrava, Tisovec, Turnov, Uherské Hradiště, Velké Meziříčí, Žnojmo. Ve dvou z uvedených měst bylo po dvou místních spolkách. V Brně pro specializovaný úkol rozhlasových pracovníků, v Č. Budějovicích z důvodů ne dosti jasných, aspoň ne nám v ústředí.

Je poučné přirovnat tento seznam ke zprávám o místním hnutí dnes.

Čtenáři, jehož místo chybí v tomto seznamu, dbejž, aby se dostalo do seznamu pro náš nejbližší sjezd v zimě r. 1947!

Čtenáři, jehož bydliště v tomto seznamu je, dbejž, aby tam zůstalo!

Národní svazy pečují, aby esperanto se šířilo všemi způsoby, a zároveň zastupují esperantské hnutí před veřejností a úřady.

Pro povahu věci musí být organizovány mezinárodně.

To je uskutečněno velmi uspokojivě od r. 1922, kdy národní svazy za kongresu v Helsinkách utvořily Stálou radu (Konstanta reprezentantaro), jež měla řídit a koordinovat propagační práci v jednotlivých zemích a tvořila s výborem Universala Esperanto-Asocio v Ženevě Mezinárodní ústřední výbor esperantského hnutí (Internacia Centra Komitato). Universala Esperanto-Asocio byla založena roku 1908 jako mezinárodní sdružení jedinců, jehož cílem je organizovat pomocí esperanta praktické služby všem, jichž duchovní nebo hmotné zájmy přesahují hranice jejich vlasti. Ty služby vykonávali místní zástupci (delegitoj), jichž bylo v době jejího rozkvětu asi 2000 v 56 zemích.

Rozvoj této organizace nebyl bez krisí. Roku 1936 krise vyvrcholila založením nové světové organizace Internacia Esperanto-Ligo se sídlem v Anglii v Heronsgate Rickmansworth u Londýna. Tato nová organizace spojuje funkci ústředí národních svazů i ústředí individuálních služeb



Fr. Bađura en Fayum (Egipto), 7. 7. 1941.
M. Miĥail, T. Inegali, G. Bibaui, S. Auad,
Fr. Bađura, A. Apoulaziz ĉe la Societo de
Biblioamikoj.

J. S. Welhaven:

La sovaĝanaso.

Sovaĝanaso kuŝas
kvieta sur la fjord';
ĝin klaraj ondoj tuŝas,
survoje al la bord'.

Ĉasisto iras ruze
en kruta ŝtonegar',
kaj pafas por-amuze
la birdon sur la mar'.

Kaj ĝi ne povas fendi
nun vojon al la nest',
kaj ĝi ne volas plendi,
la kompatinda best'.

Ĝi tial subakviĝas,
kun doloranta kor'
kaj ond' malvarma viŝas
postsignon ĝian for.

En freŝa la fukaro
nun volas dormi ĝi;
troviĝas sub la maro
kviet' kaj harmoni'.

Trad. H. Fridén.

(El Norvega Esperantisto,
majo 1946.)

Přetiskujeme tuto báseň z několika důvodů:

Je to dobrá báseň vystihující smutek z marnosti života. Upozorňuje na prostotu motivu a jednoduchost formy. Přes to je básnický účinek, jehož se chce dosáhnouti, význačný.

Dáváme ji z tohoto důvodu za příklad našim čtenářům, kteří se pokoušejí o esperantský verš s úspěchem ne vždy uspokojivým.

Všimněte si, že rytmus verše je zcela pravidelný. Střídá se tu tři a půl-stopý verš jambický s třístopým.

U - | U - | U - | U
U - | U - | U - |

Lze však ten rytmus vyložit i též jako tři- a dvou a půl-stopý trochej s předzáškou, což je výklad přirozenější, ale méně schematický.

U || - U | - U | - U |
U || - U | - U | -

Proti schematu není v překladu chyb. Jediné, co by bylo lze vytknouti, je v třetí verši třetí sloka, že »ne« je podle rytmu nepřizvučné, ač smyslem by mělo být přizvučné; ale v pravidlech esperantské prosodie se toto hledisko zvláště nezdůrazňuje.

Rým je obkročný, téměř také všade bez chyby. Nikde není adasismus, to jest rýmování sufixů. Jednou je místo rýmu pouhá asonance (subakviĝas - viŝas) ale velmi zvučná, jednou je jen kvazaú-rimo dormi ĝi - harmoni.

Slovník překladatelův je zcela prostý, neuzívá neologismů. Plyne to z prostoty jeho motivů, jež si žádá prostý básnický jazyk. Nejsme v poesii proti neologismům, ale jen pokud jejich potřeba vyvolává druh básnické myšlenky a potřeba nezvyklého slovního vyjádření. Také pořádek větný je přirozený, jediný přesun je v prvé verši poslední strofy, kde by člen měl být za předložkou a je přesunut z potřeby neproměnného rytmu.

Odporujeme našim čtenářům, kteří se pokoušejí o verše, aby esperantskou poesii četli rozbírajíce ji podle tohoto příkladu. A za četbu theoretickou dovolujeme si jim odporučiti *Parnasa guidlibro* (ach knihovnici lokaj grupoj, proĉ jste nás neposlouchali!), jež »ĉion donas krom genio« nastávajícímu poetovi, a studii dra T. Pumpra »Rým« v Ligilu 1939. S. K.

prostřednictvím delegitůj. Její orgán je Esperanto Internacia, letos vycházející v 10. ročníku.

Jsme členy této ligy jakožto asocio aliĝinta. Z příspěvku každého člena odvádíme 5 Kčs, za něž je každý náš člen zároveň Asocia Membro (AM) de IEL a dostává kupony opravňující hlásiti se o služby u delegitůj. Vedle toho přijímáme přihlášky individuálních, osobních, členů, jichž jsou dva druhy: Členové prostí (membroj kun Jarlibro MJ), kteří za příspěvek 40 Kčs dostávají ročenku (Jarlibro) se seznamem delegitůj a jinými cennými informacemi, a členové abonenti, (Membroj abonantoj MA), kteří za ročních 90 Kčs dostávají vedle ročenky i měsíčník Esperanto-Internacia. Naše členy, kteří jsou zároveň MA, pokládáme za esperantisty plně organisované, a snažíme se, aby jejich počet vzrůstal.

Vedení Internacia Esperanto-Ligo představuje tedy nejvyšší instanci hnutí. Koordinuje činnost národních svazů, pečuje, aby hnutí trvalo i v zemích méně pokročilých, zastupuje hnutí před národními i mezinárodními autoritami, pořádá mezinárodní kongresy esperanta, sleduje kroniku hnutí, pečuje o praktické používání esperanta. Nyní na př. organisuje petici k Organizaci spojených národů. Třináctý universální kongres tehdejšího ústředí byl r. 1921 v Praze (31. VII.—6. VIII.) za účasti 2567 kongresistů z 35 států.

Universala Esperanto-Asocio v Ženevě však nelikvidovalo. Vrátilo se k původní své konstrukci: mezinárodní dobrovolné sdružení esperantistů pro vzájemné služby. Také ono přežilo válku a znovu zahájilo činnost. Jeho orgánem je »Esperanto« vycházející zatímně ve svém 39 ročníku ob měsíc. Příspěvek Membro-Abonanto je 60 Kčs, Membro kun Jarlibro 25 Kčs. Navrhuje se spojení UEA s IEL, my je doporučujeme. Ale věc není zcela jednoduchá. Neboť UEA nehodlá prostě likvidovati.

IEL a národní svazy v ní sdružené představují tak zvané neutrální esperantské hnutí. To znamená, že pečují jen o rozšíření esperanta, že nabízejí esperanto, lhostejno k jakému cíli, tak jako pošta, telefon, telegraf, ovšem též jako elektrina nebo ekrasit. Také ty jsou zcela neutrální, může jich používat, kdo dovede jimi zacházeti, k cíli, jež pokládá za žádoucí.

U esperanta však o naprosté neutralitě lze stěžii mluvit. Fakt je, že se nikdy nepodařilo šířiti esperanto v protidemokratickém vládním systému. Může tedy neutralita esperantské organisace znamenati jen neutralitu k různým směrům politickým, náboženským, uměleckým, literárním, ale sotva může být řečí o neutralitě k sociálnímu a politickému staromilství.

Vedle organisací takto neutrálních existují esperantské organisace, které s šířením esperanta spojují i propagaci určitých politických nebo kulturních usilování nebo směrů.

Nejvýznačnější z nich je hnutí dělnických esperantistů (laborista movado), které spojuje s propagací esperanta šíření socialismu nejrozličnějších směrů od anarchismu po eklekticismus Labour-party. V Čechách před prvou světovou válkou měli jsme znamenitého pracovníka na tomto poli Fr. J. Chaloupeckého, jenž založil r. 1911 jako odbor při sociálně-demokratické Dělnické akademii Sdružení dělnických esperantistů (Laborista unuiĝo esperantista) s českoesperantským orgánem La kulturo, jež vycházela od r. 1912 do 1914. Po válce se toto hnutí zorganizovalo r. 1920 v Lize dělnických esperantistů v Československu (Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio) vedené hlavně J. Pechem v Plzni.

V Laborista movado je také jeden směr, jenž odmítá jednu ze zásadních směrnic esperantistické theorie. Esperanto má podle nás být jazyk pomocný, to jest pro každého druhý vedle jazyka mateřského. Proti tomu někteří z Laborista movado vznášejí protest vyhlášeje, že cílem naším má být, aby esperanto se stalo jediným jazykem lidstva, nahradíc vůbec jazyky přirozené. Proto také odmítají účast na petici k organizaci spojených národů vytýkající textu IEL kompromisnost.

Pro ideové rozpory je Laborista movado zorganizováno v různých spolicích, ale daleko nejvýznamnějším z nich byl vždy Beznárodní všesvětový svaz (*Sennacieca Asocio Tudmonda, SAT*), jejíž zkratka pro člena satano se stoupencům velmi zamlouvá. Byla založena 1921. Je zorganizována po vzoru UEA a šíří s esperantem ideje socialistické a komunistické. Vyvíjela velmi pozoruhodnou činnost publikační, ale stále byla zmítána ideologickými spory mezi různými směry komunistickými a socialistickými.

mi, mnoho svízeltů působili organisaci stoupenci anarchističtí a projevovalo se to mnoha secesemi. Ale nikdy ani publikační ani organizační činnost SAT nezaknula. Byly pořádány samostatné mezinárodní kongresy, zájezdy, školy, konference a podobně. Organem jejím byly znamenitě redigované Sennacieca revuo, a Sennaciulo. Také SAT přetrvala válku a obnovila činnost. Před válkou mívala 7000 členů. Jeden z jejich kongresů konal se v Leningradě, roku 1926, 6 - 10 srpna, se 400 účastníky ze 14 zemí. Ale od roku 1930 přestali sovětští esperantisté býti členy SAT, komunisté vytýkali vedení, že je laxní v otázkách třídního boje.

Vedle SAT nejvýznačnější je hnutí katolických esperantistů, jež je organizováno od roku 1910 jako Mezinárodní katolické sdružení esperantské (*Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista IKUE*). Má ústřední mezinárodní výbor ze zástupců zemských lig, pořádá též samostatné mezinárodní kongresy, vydává měsíčník *Espero katolika*, a po válce také znovu ožilo. Roku 1936 konal se jejich mezinárodní sjezd v Brně. Stojí za zaznamenání temata některých jejich sjezdů: Sjednocení církví, Hmotná organizace církve, Katolická sociální akce, Ochrana dívek, Všesvětový apologetický svaz, Katolíci a pacifismus, Esperanto a vystěhovalectví, Katolické misie. U nás je hlavním jejím zástupcem Fr. Buhr.

K účasti v esperantské organisaci zveme všechny, kdož chtějí přispěti k šíření esperanta. Není možno, abychom se přiblížili k svému cíli, nekráčeje v spořádaném řádku. Těm, kteří se rozhodnou jíti s námi, nemůžeme slíbiti mnoho. Můžeme jen vzpomenouti nedávno řečených slov znamenitého předsedy Ústřední rady odborů pana poslance A. Zápotockého, že za pracovní vypětí pracovníků na vybudování republiky nemůžeme slíbiti nic jiného, než že jejich děti se budou míti lépe. Ani my nemůžeme svým spolupracovníkům slíbiti nic materiálního. Jen to jim tvrdíme, že jdouce s námi pracují na pokusu jak dáti lidstvu jeden z nástrojů dorozumění mezi národy. Pracujeme na pokusu, ale stojí za to, aby tento pokus byl podnikán, a to v rozsahu o mnoho větším než dosud.

Dr. Stan. Kamarýt.

Prezidinto de E-Klubo Brno batalis en ĉs eksterlanda armeo.

En ĉeĥoslovaka eksterlanda armeo deĵoris de la jaro 1940 ĝis fino de 1945 s-ano *Frant. Baĉura*, prez. de la Brno-klubo dum 1931/32. Bonega homo, ĉiam ŝercema k. ĝaja, energia k. kuraĝa, k. sindona esperantisto. Ni opinias, ke legantoj de »*Esperantista*« trovos interesaj liajn sortojn, travivaĵojn k. spertojn pri Esperanto ĉefe en proksima Oriento. Jen sekvas konciza priskribo de l' travivaĵoj, kiel ni ilin notis laŭ rakontoj de s-ano Baĉura. Li mem pro suferinta grava malsano ne kapablas sufiĉe uzi la dekstran manon:

Post la germana okupacio: laboro en subtera organizo k. jam en februaro 1940 akuta danĝero, gestapo venas por aresti min. Tiel komenciĝis mia fuĝo ok. vojaĝo eksterlanden en ĉeĥoslovakan armeon. Kelkajn tagojn mi kaŝadis min en Brno, apud Brno, Praha, Přerov, fine mi feliĉe transiras slovakon landlimon per ŝarĝvagonaro al Púchov k. Bratislava. En marto 1940 mi transiras nokte kun 10 oficiroj hungaran limon, sed trafas nin la unua akcidento; ni estas arestitaj k. eskorte venas en Budapeŝton. Tie en karcero pli ol 300 ĉeĥoj-fuĝintoj k. ni spertas malsaton, malvarmon, pedikojn, dormadon sur cemento sen kovriloj.

Post unu monato postulas gestapo mian transdonon - ili juĝas, ke mia kulpo estas aparte granda, ĉar mi estas polica inspektoro, kiu eĉ moviĝis inter ili - k. mi estis eskortata en Košicen k. sur limo atendas min malbona fino. Sed ne, en tunelo ĉe Košice denove per fuĝo mi savas min, ricevas helpon de la Pola Ruĝa Kruco, k. en la sama nokto vagonare Budapeŝton. Tie franca konsulejo organizas vojaĝojn en Jugoslavion. El Budapeŝt al la jugoslava limo ni estis forveturigataj per aŭtomobiloj, nokte denove transiro de la limo trans marĉejoj, tiam jam sukcesa. Sur la limo frata akcepto fare de jugoslava limĝvardio k. venontan tagon komforte en Beogradon.

Ni legis.

Sinjorino Roosevelt ricevis multajn sugestojn por Esperanto. S-ino Roosevelt, kiu jam plurfoje okupis sin la temo dde dua lingvo por ĉiu apud la respektivaj gepatraj lingvoj, antaŭ nelonge skribis en *The Daily Telegraph*: »Unu el la plej gravaj helpoj por paco estus la adopto de unu lingvo, kiu estus instruata en ĉiu lernejo al ĉiu infano en la mondo... Multaj skribis al mi sugestante, ke Esperanto estu tiu lingvo. Tio ŝajnas al mi iom nepraktika.« Se sinjorino Roosevelt povus foje ĉeesti Universalan Esperanto-kongreson, ŝi certe ŝanĝus sian opinion pri la »nepraktikeco« de Esperanto. (Heroldo de E. 1. julio 1946).

Letero de Wanda Zamenhof. Okcident-sveda saluto estas ciklostilita bulteno de Okcident-sveda distrikto de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio, kies numeron 2-an de dua jarkolekto ni ricevis. Ĝi aperas en Göteborg. La enhavo estas tre simpla, multaj adresoj de korespondantoj. Por ne-membroj estas interesa letero de Wanda Zamenhof, kiun ni represas: Al sinjoro Einar Adamson, Värmlandsgat 18, Göteborg. Kara samideano! Viaj pakajoj sendataj al ni dum germana okupacio faris al mi grandan plezuron. Ili estis hela radio en nia malĝoja tiama vivo. Ili estis por mi pruvo, ke ni ne estas forgesitaj, ke ni posedas amikojn en la vasta mondo. La jaroj, kiam Vi sendis pakajojn, estis teruraj por ni; mi jam ne havis sciigon de mia edzo, sed ankoraŭ mi havis miajn proksimajn familianojn. Mi loĝis kun mia patrino, kun miaj ambaŭ fratinoj, preskaŭ ĉiun tagon ni kunvenis kun Sofia kaj Lydia. La kruela sorto forrabis preskaŭ ĉiujn. Feliĉe savis sin mia filo kaj unu fratino, kies edzo estis malliberigita. Mi laboras en mia fako, kiel okulkuracisto, Ludoviko studas en Politekniko kaj mi esperas, ke li fariĝos bonega inĝeniero. Mi kore salutas Vin kaj svedajn samideanojn.

En Sovet-Unio nun funkcias Unuiĝo de Sovetaj Esperantistoj. Prezidanto estas kapitano Nekrasov. Tiel raportas sen pluaĵoj detaloj bulteno »Okcident-sveda saluto« n-ro 2 el aprilo 1946.

Terura kaj kortuŝa historieto estas rakontita en Svisa Esperanto aprilo-Majo 1940: Dank al Esperanto. La 21-an de majo 1940 mi troviĝis en la ur-

bo A... (Francujo). La soldatoj de la invada armeo alvenis en tiun urbeton, kiam ekvesperiĝis. La sekvantan matenon ili arestis multajn civilulojn. Mi mem estis unu el tiuj arestitoj kun Alĝeriano kaj Belgo. Ni estis lokitaj apud muro, kie ni apogiĝis, la brakoj supren. La Belgo estis Esperantisto kaj mi mem iomete lernis la lingvon. Ni do interŝanĝis kelkajn vortojn. Subite germana gardstano proksimiĝis kaj demandis:

— Ĉu vi estas esperantistoj?

— Jes.

— Bone, mi provos helpi vin forkuri, ĉar la grupo estas elektita por esti mortpafita.

Poste li foriris. Eble unu horon post tiu interparolo en la momento, kiam atento de ĉiuj arestitoj estis altirata al tio, ke unu arestito ĵus ricevis baton en femuron pro tio, ke li mallevis la brakojn, mi sentis min altirata malantaŭen.

Mi turnis la kapon kaj rekonis la germanan soldaton, kiu demetinte la kaskon faris signon al mi. Mi falis teren, imitata de la Belgo kaj Alĝeriano, kiuj mem ankaŭ vidis la signon. Ni rampis ĝis malantaŭ la proksimaj domoj. Alveninte tien, post rapida manpremo mi forkuris tra la kampoj.

Poste mi eksciis, ke 141 civiluloj estis mortpafitaj tiun tagon.

Dank' al Esperanto mi kaj miaj du kamaradoj, pri kiuj mi nenion sciis poste, estis savitaj.

Jen kial mi finlernas la lingvon kaj gvidas kurson en nia loĝurbo.

A. J.

Amikoj de Esperanto en Brazil registaro. Sekve de politika movado okazinta la 29-an de oktobro lastjara forlasis la prezidentecon la Brazil Respubliko d-ro Getulio Vargas, kiun anstataŭis la Prezidanto de la Supera Federacia Tribunalo s-ro ministro José Linhares. Ĉe la organizado de la ministerio ni havis la plezuron vidi, ke estis nomita ministro por edukado kaj saneco s-ro prof. Raul Leitao da Cunha, kiu, tiam rektoro de la Brazil universitato, faris ĉe la deka Brazil kongreso de Esperanto okazinta en Rio de Janeiro la belan kaj erudician paroladon, kiu ĝin malfermis. Estis ankaŭ granda nia ĝojo pro la elekto de nia bona amiko s-ro ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, al kiu tiom ŝuldas Esperanto, por la ofico de Regdelegito de Sao Paulo, la plej grava ŝtato de la Federacio. (El O Brazil Esperantista, dec. 1945.)

En la ĉefurbo de Jugoslavio funkciis ĉs. militista oficejo, do unue rekrutiĝo k. envicigo en transporton al Beirut kun fina destino: Francio. Mia transporto estis forvojaĝonta nur post du monatoj, do mi laŭ la jarlibro elserĉis tiean esp. klubon k. dum du monatoj mi ĝin regule vizitadis. La kunvenoj okazadis precize, malgraŭ la senteble kreskanta k. pliakriĝanta krizo k. danĝero k. ŝate mi ilin partoprenis. Post du monatoj mi adiaŭis la gastamajn, zorgoplenajn, sed firme deciditajn samideanojn k. forveturis al Beirut. Sed en Francion ni jam ne veturis, Francio estis venkita k. kapitulacis. Ni estis transprenitaj de Angloj k. veturis en Palestinon, kie estis formata ĉs. korpuso de Meza Oriento. En Palestino ni submetiĝis al funda militista edukado k. ekzercado, nu k. sekvis kutima k. tamen eksterordinara soldatvivo k. kampado. Kaj renkonten al samideanoj de Jerusalemo, Betlehem k. de aliaj lokoj. Ĉie ĉora akcepto, ĉie fervoro, ardo, vigla vivo, multegaj konatiĝoj k. amikaj rilatoj, multegaj konatiĝoj kun esperantistoj-soldatoj el la tuta mondo, nome Angloj, Aŭstralianoj, Novzelandanoj, Poloj, Hindoj, Afrikanoj ktp. Same en Tel Aviv, Haifa k. a. Ne mankis prelegoj pri Ĉeĥoslovakio k. oftaj informoj. Ankaŭ en ilia societo vizitoj al memorindaj k. sanktaj, lokoj, al la Morta maro.

Post finekzercoj dejore en Egipton. Post alveno en Aleksandrijo mi tre baldaŭ ekinterrilatis kun s-anoj. Tiam prezidanto de la klubo, kun multaj membroj, estis s-ano Bell, bonega, vigla k. tre aktiva homo. En la klubo diversaj nacioj, krom Egiptanoj, Grekoj, Angloj k. a., societo amika, tre agrabla k. ĉarma k. interesa.

En Egipto oni bone vojaĝis, soldatoj havantaj forpermeson veturis senpage. Dum mallongaj forpermesoj mi entreprenis multajn ekskursojn al Kairo, kun belegaj ĝardenoj k. granda zoologia ĝardeno, al piramidoj k. sfinksoj, templo Karnak, en Valon de reĝoj, Luksor, Fajum, Assuan ĝis al limo de Sudano. Mi ne forgesos amikaĵojn de s-anoj en Fajum, nome Migalli k. Nasif. Ankaŭ mi estis enkondukita de egiptaj samideanoj al potenca guberniestro. Akcepto okazis kun plena patricia digno k. laŭ tradiciaj ceremonioj k. invito al solena vespermanĝo en granda luksa palaco halo, oraj pladoj k. pokaloj, juveloj, sudanaj negroj bunte zonitaj, ĉion vidantaj k. ĉion sciantaj, mirakle priservis divenante k. tuj plenumante ĉian ajn deziron. La altrungulo mem parolis Esperanton. Lia persona sekretario arda esperantisto k. ĉarma amiko. Donace mi ricevis egiptajn skulptaĵojn k. aliajn karajn memorizaĵojn.

En Oriento mi renkontadis ĝenerale bonege parolantajn s-anojn, lingva talento de l' orientanoj estas ja konata. Ofte mi vojaĝis dejore inter Egipto k. Palestino k. okazis diversaj k. surprizaj renkontoj kun esperantistoj.


Vagante en montoj de Judeo mi falis en manojn de Beduenoj, ili estas timindaj k. konataj rabistoj. Kiam mi diris, ke mi estas el Ĉeĥoslovakio, ili tuj ŝanĝis sian konduton, iĝis amikaj, troviĝis inter ili unu, kiu konis nomon de prezidento Masaryk k. montris lian portreton, kiun li portis ĉe si. Kaj poste mi estis laŭ ilia plej bona ebleco gastigita k. la sekvantan tagon tre bone adiaŭis.

Venis bataloj ĉe Tobruk, El Alamein, elpelo de Rommel el Afriko k. ĉs. korpuso en la j. 1944 veturas en Anglion. Tie trafis min danĝera meningito k. akceptas min hospitalo en Hammersmith. Skribinte al esp. klubo londona, mi ricevas karan k. simpatian viziton de s-anino Major, kiu alportis diversajn esp. gazetojn k. librojn. Post resaniĝo mi venis al mia korpuso en Southend-on - See, bela marurbo k. banloko sude de Londono. Kore mi rilatis kun multaj samideanoj k. iliaj familioj, nome kun s-ano Murray. Dum la instruista kongreso en Londono prelego pri Ĉeĥoslovakio k. intervjuado.

En Anglio estis la movado tre aktiva, sistema k. vigla., novaj amikoj ĉe ĉiu paŝo, esp.-soldatoj en ĉiuj aliancaj armeoj. Plaĉis al mi tie, ĉeĥoslovakoj estis ŝatataj, ĉiu plene renkonten iris al ni, Angloj scias mirinde labori k. esti tre ĝajaj, la virinoj tre serioze k. eminente plenumis taskojn en ĉiuj fakoj.

En oktobro 1945 aŭtomobile trans Francio k. Germanio en denove liberan, sopiratan patrujon.

Miaj spertoj pri Esperanto, kiu akompanis min dum la tuta vojaĝo, estas la plej bonaj, rememoroj la plej agrablaj. Ĉie mi per ĝi trovis amikan



Fr. Bađura en Kairo ĉe Isis-statuo.

medion, helpemon, agrablajn k. klerajn kunulojn. Neniam mi preterpasis okazon elserĉi ilin k. ne estis urbo, kie ili ne estus.

Finante, mi elkore dankas ĉiujn samideanojn el Jugoslavio, Palestino, Egipto, Anglio k. la ceterajn el la tuta mondo, kiujn mi renkontis neatendite sur miaj vojoj.

Skribis J. Vondroušek, nuna prez. de E. K. en Brno.

Josef Vitek:

Gajaj rememoroj el Svedujo.

(Daŭrigo)

La klubo en Malmö estas en sia laboro ekzempla. Ĝi posedas belan klubojn kaj pli ol cent membroj kreas belan insulon de Esperantujo. La 40jara jubileo estis vere malgranda internacia kongreso aŭ almenaŭ ĝia provo. Granda luksa salonego de la urbodomo gastis amason da diversnaciaj gesamideanoj. Sufiĉas mencii, ke venis por ĉeesti 55 danaj esperantistoj, inter ili eminentuloj-pioniroj, fraŭlino Noll, samideano Vasiljev ktp. Tagmanĝo, amuza vespero post la ĉefa jubilea programo, ĉio, ĉio estis tre bone organizita kaj ni ĝojas, ke tiuj ĉi spertuloj prizorgos internacian kongreson 1948. Sed post la bela taĝo venas denove la prozo de l' vivo kaj mi haltas en malgranda urbo Tranas. Tie Esperanto ankaŭ bone vivas. Multaj poloj laboras en tieaj ledofabrikejoj. Jam sekvantan matenon mi forveturas en belegan Linköping, urbo kun malnova katedralo kaj aliaj konstruaĵoj, flugmaŝina kaj vagona grandkonstruejo. Instruistino Dora Andersson kaj ĉefredaktoro Hilmer Johansson zorgas pri mi. Entute tri prelegoj elĉerpas mian restadon inter tre agrablaj gesamideanoj. Norrköping akceptas min. Neniam mi pensis, ke tiu ĉi urbo estas tiel granda kaj bela samtempe. La vespero en la klubo estas neforgesebla. Ĉu vi volas bone amuzi, ĉu vi volas danci, entute ĉu vi volas bonfarti? Jes, tiam vi devas viziti la kluban kunsidon. Mia prelego okazis dum la ĉeesto de 60 gesamideanoj el 5 nacioj kaj la horoj ĝis la noktomezo tre rapide pasis kaj ni tamen ankoraŭ ne volis hejmen. Trankvilaj Svedoj montris al mi multfoje, ke ili konas esti ankaŭ agrable gajaj, ke ili konas la valoron kaj mallongecon de la vivo. Sed Norrköpinganoj posedas ankaŭ belan esperantohejmon en la proksimeco de la urbo, kie ni agrable pasigis sekvantan posttagmezon. Amiko Pihlström, ĉu nia bela redaktorino bonfartas? Ŝi skribis vere tre bonan artikolon pri Ĉeĥoslovakio. Dankon!

Matene forportas min. la vagonaro en industrian Eskilstuna, kie mi de post la kongreso en Parizo havas mian amikinson Helga. Estas iom da diferenco inter tiu kaj tiu ĉi tempo. Pasis 14 jaroj kaj nun ni ambaŭ havas siajn proprajn familiojn kaj restas nur rememoro. Vesperan prelegon sek-

«Batalintoj por libera Hispanujo laŭ parolado de s-o Haiderer en la E-grupo Harmonio en Wien XV. la 21-an de dec. 1945 apartenintaj al 27 nacioj dum la enlanda milito interkomprenigadis esperantlingve. Kiam Franco venkis, la internaciaj brigadoj estis fortransportitaj en tendaron en Francujo. Ankaŭ tie renkotiĝis multaj esperantistoj kaj ili eĉ aranĝis »kongreson« dum kiu ili ĵuris ekbatali por Esperanto veninte hejmen. Eĉ en koncentrejo Dachau oni interkompreniĝis per Esperanto. (Mittellungsblatt, Wien, Marto 1946.)

Jam aperas turisma materialo esperantlingva. Bela ilustrita broŝuro pri la urbo Brugge estas senpage havebla de la urba administracio. Skribu al Oficiala Servo por Turismo, Kakke-Markt, Brugge, Belgio.

Demokratizo de Pollando. La plej karakteriza eco de nuntempa Pollando el et hilteriana juĝo liberigita, estas la grandega procedo de demokratizo de la lando, kiu apenaŭ nun, do kompare kun Okcidentaj landoj kun ĉirkaŭ 100-jara malfruiĝo vere okazas ĉe ni... Vere ne en tio, ke ni nomiĝas respubliko; ankaŭ ne en tio, ke ĉefoj de tiu respubliko estas iamaj laboristoj kaj oficistoj; nek en tio, ke en oficiala titoligo ni ne plu uzas la feŭdalan vorton »pan« (sinjoro), sed la vorton »obyvatel« (civitano); ĉio ĉi estas ĝustaj sed nur eksteraj signoj de demokratizo. La vera esenco de tiu demokratizo konsistas en tio, ke la pola popolo fariĝis ĝuste dum la terura okupado plenkonscia nacio, sentanta sin kiel unuo, kiel tutaj, plene respondeca pri la sorto de sia patrujo, deziranta preni sur sin la taskon de ĝia gvidado kaj evoluo - same ekonomia kiel kultura. Fine - ke tiu-ĉi pola popolo - per siaj plej konsciaj reprezentantoj kaj gvidantoj - volas fariĝi egala al la plej evoluintaj nacioj kun ilia socia kaj kultura progreso. (Pola esperantisto, n-ro 1-a, majo 1946. Krakow)

En Hungario oni ankaŭ ne atentis la nun tre ofte legatan devizon pri ekonomio en fondado de Esperantogazetoj kaj bultenoj. En Budapeŝt komencis aperadi ciklostilita »Informilo. Raportoj de Hungaria Esperantista Societo laborista«, tri paĝoj redaktitaj de Sas Béla, kies devizo estas »Per Esperanto por socialismo«. Ni represas el ĝi poemon de

K. Kalocsay:

RETROVO.

Popoloj elsangintaj, ĉu vi havas
Ankoraŭ forton por kunigo frata,
Dum vin nun kiel skurĝo senkompata
La frosto kaj la senpaneco trafas?

Okuloj viaj de malsato kavas,
Kaj la heredo de abomenata
Hokkruca stulto kaj frenez' mondbata
Vin premas, ke vi krias: kiu savas!

Tamen, la mondo post la prov' terura
Devas revivi kaj en vivo nova
Forĵeti rubojn de l' pasint' malpura.

Kaj preni en la koron kun retrova
Gojo la ĝermon de l' fratec' futura:
La benon de l' heredo Zamenhofa.

Ni represas tiun ĉi poemon ankaŭ kiel modelon por niaj versfarontoj! Atentu, kamaradoj! La temo mem estas preskaŭ banala. Ĉiu ja nun deklamas pri abomeneco de Hitlera stulteco kaj pri la homara frateco. Sed atentu la formon: senstumblaj elizioj, sonantaj, ne ofte legataj ritmo, tute natura vortordo, malmulrimoj faras el tiu ĉi soneto soneton majstran. La poemfara virtuozecco de Kalocsay dum la sepjara silentado ne malkreskis.

Aŭstriaĵ esperantistaj fuĝintaj el la lando antaŭ la nazistoj. Laŭ informo en la plenkunveno de Aŭstria Esperantista Federacio (31. III. 1946) vivas Eckstein en Svedio, Bernfeld en Ameriko, Mildwurf en Londono, familio Parnes en Afriko, Klein en Londono. Ĝis nun neniam sciigoj alvenis pri sorto de iama honora prezidanto de AEF prof. dro Hugo Jokl kaj de eldoninto kaj ĉefredaktoro de la vaste konata Esperanto-jurnalo Verda revuo s-o Franz Schreibenreiter. (Mitteilungsblatt für Mitglieder, Funktionäre, des Esperanto, April-Mai 1946). Ni aldonas al tiu informo esprimon de ĝojo, ke samideano Hugo Jokl travivinta arestejon Terezín vivas nun ĉe ni en Tábor.

Esperanto en Aŭstriaĵ lernejoj. Vicprezidanto de AEF inspektoro dr Führung transdonis al la plenkunveno de AEF gravegan komunikon. Post persista agado li sukcesis rilate al Esperanto enpenetri en Ministerio por Instruado. La leĝaj bazoj por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn nun estas kreitaj. En la oficiala dekreta bulteno n-ro 3 aperis jam la instruplanoj por Esperanto,

vas orkestra muziko, kiun gvidas la kluba prezidanto. Okazas ankaŭ lotumado. La unua premio estas tre konata esperantigita libro Gösta Berling. Sed ankaŭ nun la feliĉo estas blinda kaj la libron gajnis neesperantisto. Tamen ni almenaŭ esperu, ke tiu gajno instigos lin lerni la lingvon. Sekvantan tagon pluvego akompanas min ĝis en Stockholmo, kie denove atendas min al ni jam konata samideano Bernhard Eriksson, ĉe kiu mi loĝas kaj kun kiu mi pasigas ĉiujn neforgeseblajn horojn en la ĉefurbo. Kian ĝojon mi havis, kiam ni vizitis la printempajn studentajn festenojn en Skansen. En Skansen montras la Svedoj, kiel aspektis tuta Svedio antaŭ kelkaj jarcentoj. Vi trovas malnovan Skanion same kiel Laplandon kaj komparas la diferencon. Sed por Skansen kaj ceteraj partoj de la ĉefurbo vi bezonas minimume unu semajnon. Tre interese estis por mi ankaŭ vidi la festotagon de la laboro: la 1-an de majo. Ĝi estas tute alispeca ol en nia lando kaj organizita per la sindikata movado. Ĉiuj fakoj portas siajn flagojn kaj la okuloj de l' esperantisto ĝojas vidante inter la aliaj grandan esperantoflagon same kiel propagandajn ŝildojn. Multaj orkestroj gvidas la homamason ekster la urbon, kie okazas la programo de l' festeno: belaj kantoj de unu laboristo, amatora kantisto, prelegoj de l' gvidantoj de la sindikata movado, prelego de la ĉefparolanto ministro Viggfors kaj kantado de ĉiuj. Trankvila, serioza festeno, kiel ĉiam ĉe la Svedoj. Interese por la Ĉeĥoslovakoj estas vagi tra Stockholmo, kies konstrusistemo kaj entuta aspekto estas tute alia ol tiu de Praha aŭ aliaj niaj grandurboj. Tri tagoj tamen tre rapide pasas k. nun mi vizitas jam konatajn urbojn Vingaker kaj Västeras, kie estas denove intereso pri la prelegoj. Jam en Stockholmo oni konstatas tiujn tre klarajn noktojn, kiuj por ni simplaj mezeŭropanoj estas malkonataj kaj iom strangaj. Nun veturante ĉiam pli kaj pli norden mi povas uzi la nokton por trarigardi la belecojn de la regionoj, kiam la tago ne sufiĉas. Krylbo kaj Avesta estas urbetoj kun multaj esperantistoj, tre bonkoraj kaj veraj amikoj de nia ŝtato. Tra fama Hedemora mi forveturas en Borlänge, kie mi dufoje prelegas sub la gvidado de konata eksinstruistino Boden kaj amiko Jansson. La 11an de majo akceptas min malnova minejurbo Falun kun siaj kuprominejoj kaj multaj fabrikoj. Estas necese menciigi, ke la kuprominejo apartenas al la plej malnova eŭropa akcia societo. Ĉiujn elspezojn de batalantaj Svedoj en la tridekjara milito estis financitaj per la gajno de tiuj ĉi minejoj. Interesa estas la urbo mem, kiu havas diversajn vidindaĵojn kaj malgrandan havenon. Falun estas la centro de l' koro de Svedio-Dalekarlio. Kvindek kilometroj dividas nin de pitoreska lago Siljan kun la urbetoj Mora, Leksand kaj la vilaĝo Rättvik. La viziton de tiu ĉi regiono oni devas nur rekomendi al ĉiu vizitanto de Svedio, ĉar nenie estas tiom da folkloro beleco kunligita kun la naturbeleco kaj originala vivo de la loĝantaro. Plej grandaj festenoj okazas dum la punkto de sankta Johano. Tiun nokton oni ne dormas, ĉar oni bonvenigas la noktomezan sunon. Dalekarlia ligna ĉevalo originale kolorigita kaj pentrita restas kiel inda memoraĵo al tiu tre vizitinda regiono. (Daŭrigo).

Ĉeĥaj gazetoj kaj Esperanto.

Sinteno de gazetaro al nia movado estas iom alia ol ĝi estis antaŭ tiu ĉi milito. La ĵurnaloj mem estas aliaj. Ili sentas sin pli respondecaj pri evoluado de la aferoj. La amplekso de ĵurnaloj estas malpli granda. Ankaŭ pro tio enmeto de artikolo sendita el ekstero ne estas tiom hazarda ol ĝi estis sisteme. Tial ni povas esti ĝenerale kontentaj pri la fakto, ke spite la ŝanĝita situacio aperas en ĉeĥa gazetaro artikoloj pri nia movado. Sed grava diferenco kompare kun la epoko pasinta estas ankoraŭ en tio: Aperas artikoloj ne senditaj de ni propagandistoj.

La statistikon ni faros en fino de la jaro. Pri jaro 1945 ni diris ion jam en la raporto pri kongreso sur paĝo 10. Tie ĉi ni volas raporti ne komplete, sed pri aperaĵoj gravaj aŭ interesaj pro iu speciala kialo.

Ĉin, provinca organo de ĉs. sociala demokratio en Brno, aperigis kurson de Jan Zeman en 19 lecionoj 6. I. - 22. V. La kurso havis konsiderindan resonon. Sed krom la kurso aperis kaj aperas tie multaj priesperantaj artikoloj, el kiuj precipe menciinda estas tiu de Jaroslav Tomčík (18. I.),

kiu priskribas liajn spertojn de eksterlanda ĉeĥoslovaka soldato dum la milito en Beograd, Istambul, Ankara, Francio, Anglio. Ni citu la sinceran konstanton de batalanto pro kaj por socialisma demokratio: »En ega politika kaj morala malordo, en kiu ni trovis Francion dum la jaroj 1939-40, mi povas kun bona konscienco diri, ke la francaj esperantistoj, kiujn mi renkontis, staris en tiu franca konfuzo kaj ĥaoso firme kaj kuraĝe«.

Lidová demokracie havis 6. I. felietonon de Emil Zavadil »Ĉu ni ne malatentas Esperanton?« La teksto pendis poste atentige aranĝita en pluraj vestibloj de universitataj haloj en Praha kun Asocia adreso.

Práce, organo de Revolucia sindikata movado, versimile la plej legata ĵurnalo, enhavas de post aprilo 1946 mallongajn sed eĉ por esperantistoj interesajn artikolojn Z esperantského světa (El Esperanto-mondo) preskaŭ ĉiusemajne, verkatajn de Julie Šupichová, kies ĉifron Ejs ni tie salutis kun aparta kontenteco.

En *Právo lidu* el 6. I. ni legis: »Sur nigra tabulon de niaj »rimarkoj« ni alnailas tiajn aferojn, kun kiuj ni malkonsentas, kaj kiuj estas en intereso de sana ŝtatevoluo forigendaj. Tial ni pri ili kritike atentigas en nia ĵurnalo. Sed oni faras ankaŭ multajn etajn memorindajn aferojn, kiuj meritus esti publikigitaj sur iu - honortabulo. Kiel ekz. tiu ĉi kazo: niaj ĉefaj esperantistoj prizorgas ĉiutage regulajn disaŭdigojn, kiuj - precipe tiuj disendataj sur mallongaj ondoj - estas diligente aŭskultataj de esperantistoj en la tuta mondo. Se vi tion ne kredus, redakcio de esperantlingvaj disaŭdigoj montros al vi leterojn el ĉiuj partoj de la terĝlobo. Kaj kiom eksterordinaran signifon propagandan havas tiu ĉi laboro por la respubliko, estas vidate precipe el leteroj de esperantistoj svedaj. Tiuj niajn disaŭdigojn ne sole regule aŭskultas sed ankaŭ fiksis skribe, tradukas sveden kaj tiamaniere akiritajn sciigojn disponigas al la sveda preso. Tiel represas tiajn informojn precipe svedaj social-demokrataj gazetoj. Per tiu ĉi agado de nia esperantlingva disaŭdigo estis en nordaj landoj paralizita agado de malĝaje fama Jaksch.« - Tiajn artikolojn ni legas kun aparta ĝojo. Ili ne »propagandas«, ili simple raportas pri la faktoj. Kaj tio estas la plej bona kaj efika propagando. La ĉifro jam akceptu nian dankon kaj gratulon.

Jiráskův kraj, oficiala organo de Distrikta nacia komitato en Náchod, aperigas preskaŭ regule, proksimume ĉiun monaton, kroniketon de Šupichová »El Esperanto-mondo«. La 28. VI. aperis post la ĉeĥa teksto de Šupichová (25 linioj) senerara esperant-lingva teksto verkita de la redakcio mem, kiu dankas nederlandan samideanon Faulhaber pro la sendita letero. La redaktoro sinjoro Šimáně akceptu nian gratulon pro bona scio de nia lingvo.

En *Turistické noviny* ni trovis du artikolojn de Šupichová »Esperanto, helpanto de turismo« (7. IX. 45) kaj »Bona afero venkis« (2. I. 46).

En *Hlas*, organo de ĉs. partio popola en Moravská Ostrava, aperas regule ĉiusemajna rubriko. Ankaŭ en tiea *Československá demokracie* ni trovis artikolojn. La samideanoj de la urbo akceptu dankon pro ilia persistemo, kiu havas rezulton tre rimarkindan.

En Olomouc aperas relative ofte diversaj sciigoj en *Osvobozený našinec*, *Stráž lidu*, *Volné slovo*.

El *Svobodný směr* en Plzeň estu tie ĉi tradukita (el 11. V.) sekvanta artikolo: Holanda esperantisto dankas. Dum tiuj ĉi tagoj ricevis s-ro Josef Hylák, frizisto en Plzeň, esperantlingvan leteron kun sekva enhavo: Denove estas permesite sendi leterojn en fremdlandon kaj mi promesis skribi al Vi. Mi estas jam en mia patrujo. Mi dankas al Dio, ke la milito estas finita kaj mi ne estas morta. Longe mi estis malsana. Mi pezis sole 52 kg. Neniaj mi forĝesos la tagon, kiam mi estis liberigita el la koncentrejo fare de ĉeĥoslovakaj partizanoj. Se ne estus partizanoj, mi estus hodiaŭ morta. Tri semajnojn mi estis en malsanulejo en Protivín kaj ĉeĥa kuracisto aranĝis, ke mi povis esti enhejmigita. Neniaj mi forĝesos Vian bonan helpon, kiam mi estis en Plzeň, ke Vi donis al mi panon kaj monon. Ĉiam mi tre dankeme rememoros Ĉeĥoslovakion. La popolo estis ĉiam bonkora kaj bona. Mi esperas, ke Ĉeĥoslovakio estos feliĉa lando, granda kaj riĉa lando kaj lando ĉiam libera. Ĉu Vi povas sendi al mi foton de Dro Ed. Beneš?

kiujn aprobis kortega konsilisto d-ro Wollmann de la instrusciencia fako en la ministerio. Bedaŭrinde nun ĉiam ankoraŭ mankas sufiĉe da taŭgaj fakaj instruistoj. Tial okazas en la Pedagogia instituto de urbo Vieno speciala E-kurso por estontaj E-instruistoj en la lernejoj. Aŭtune okazos la unuaj ŝtataj Esperanto-ekzamenoj por instruistoj; ĝis tiam la kunmetota ekzamenkomisiono jam funkcios. En la lernejoj diversgradaj rajtas instrui Esperanton nur fakaj, ŝtate ekzamenitaj instruistoj. La bazoj do ekzistas, nun dependos la sukceso de tio, ĉu sufiĉe multaj gepatroj instigos siajn infanojn lerni Esperanton en la lernejoj. Tial ni devas fari nun laŭcelan propagandon ankaŭ tiudirekte (Mitteilungsblatt für Mitglieder, Funktionäre... des Esperanto. April-Mai.)

Propran hejmon de AFE en Wien sukcesis instali ĝia estraro, du ejoj kaj ĉambregon por kunsidoj, paroladoj kaj similaj celoj. La sekretario funkcias ĉiutage inter 14a kaj 18a horoj. Kompreneble por la modestaj kotizoj la estraro tion ne estus povinta efektiviĝi, sed kun varma danko ni povas komuniki al la ĝen. kunveno, ke la Viena Laborista Ĉambro kaj la Kultura Oficejo de la urbo Vieno subvencii la kulturalan agadon de la federacio ĉiu per ŝil. 1000.— (Mitteilungsblatt für Mitglieder, Funktionäre... des Esperanto, April-Mai 1946). Wien estas tre detruita, tamen la publikjuraj instancoj de la urbo aperigas multe pli da praktika helpemo al kultura celado ol la instancoj en Praha.

Pri ni mem ni legis plurfoje en tre diversaj gazetoj. Internacia kulturo (Sofia) nro 5. enhavas longan artikolon de P. Šimon pri Lidice kaj adresaron »Kontaktu kun frata Ĉeĥoslovakio!« The British Esperantist el majo-junio atentigas pri artikolo en Esperanto internacia 4-a n-ro kaj sciigas, ke multaj membroj skribis al ili, ke la Praha-disaŭdigoj (470,2 metroj) lundojn kaj jaŭdojn estas tre bone aŭdeblaj (la ceteraj ondoj malpli bone) kaj la temoj tiom interesaj, ke »ili meritas apartan atenton«.

Espero katolika, oficiala organo de IKUE aperas jam la 43-an jaron. Abono ĉe ni Kĉs 60,— pagebla al Legio-banko en Praha. Informojn donas Fr. Buhr. En numero el marto ni legas ĉe okazo de kardinal-elekto jenan respondon de Papo: »Malprok-

sime de Dio kaj sen Dio vera unueco ne estas ebla. Multaj rigardas al la Eklezio kaj demandas, kiun rolon ĝi ludos por certigi la pacon en la mondo, sed la Eklezio ĉirkaŭprenas la tutan socion. Neniam la Eklezio intencis superregi la mondon en la senco de imperialismo. La Eklezio nur rigardas la homon mem. Ĉiutamaniere la Eklezio fondis la homan socion».

Psalmo 129 tradukita en Esperanton el la latina teksto (nova) aperis en *Espero* katolika (1946 majo). La traduko estas stranga. La konata psalmo (De profundis clamor ad te Domine) estas tradukita tiom malzorge, ke eĉ la nombro de silaboj ne koincidas. La psalmo estas kantata. Kiamaniere oni kantas la du plujajn silabojn en la Esperanto-teksto? (Ĉu per verdaj muzikistoj?)

Jugoslavia Esperanto-Federacia havis fond-ĉef-kunvenon en Zagreb la 14-an de aprilo 1946. Ĉeestis la reprezentantoj de Kroata Esperanto-Ligo, de Slovenia Esperanto-Ligo kaj de opaj esperantistaj societoj sed mankis reprezentantoj de serbaj esperantistoj. La statuto de JEF estis ĉiesvoĉe akceptita. Jugoslavia Esperanto-Federacio estos ĝenerala reprezentanto de jugoslavaj esperantistoj ĉe ilia popola registaro kaj reprezentanto de la movado por internacia Esperanto-organizo. Ordinaraĵ membroj estas respublikaj Ligoj, kie ili ne ekzistas, opaj esperantistaj societoj. Jugoslavia Esperanto-Federacio eldonados ankaŭ sian propran organon kiel daŭrigon de antaŭmilita »La suda stelo«. Oni elektis provizoran komitaton, kiu funkciis ĝis aŭtuno, kiam okazu regula ĉefkunveno. Kiel prezidanto estis elektita Dro Ivo Lapenna. Adreso: JEF en Zagreb, ul. Nezname Junakinje 1/III. (Laŭ ciklostilita organo de la Slovenia Esperanto-Ligo »Triglavo«, 2a N-ro, aprilo 1946.)

Nia lingvo. Oni povas renkonti samideanojn, kiuj taksas la lingvon kiel negravajn, preskaŭ kiel bedaŭrinde necesan kromajn, kiun oni devas nur iomete atenti por sukcesigi siajn praktikajn (!) planojn kaj skemojn de la ĉiutaga vivo. Tiuj niaj kunlaborantoj ne volas intime rilati kun la lingvo *kiel lingvo*, kun ĝiaj subtilaĵoj, delitakaj nuancoj kaj esprimopovoj. Ili diras ke Esperanto estas antaŭ ĉio ilo, kiun oni uzu. Oni ne malsparu tempon pri tio, ĉu

La semajna ĵurnalo *Jiskra* (Fajrero) en *Třebíč* daŭre disponigas siajn paĝojn al artikoloj koncernantaj nian aferon. En numero 9. V. 1946 ĝi aperigis el Esperanto tradukitan respondon de svisino A. Früh el S. Galen, kial ŝi simpatias kun Ĉeĥoslovaka respubliko. La respondon iniciatis kaj tradukis Asocia sekretario J. Mařík, kiu uzis la ricevitan honorarion por aboni al la aŭtorino nian revuon. La saman nomon havas ankoraŭ *Jiskra*, semajngazeto de ĉs. socialdemokratio en Tábor, kie nun aperas sciigoj dank' al aktiveco de nia nova grupo en *Tábor* kaj *Jiskra*, organo de Minej- kaj fandej-entrepreno en *Vitkovice*, kie ni 14. II. vidis ampleksan sciigon pri kurso en la fabriko lernejo.

La enmeto de Esperanto en programojn de la ŬRO *Labor-lernejoj* signifas jam pro la fakto mem grandan publikecon por ĝi, ĉar la Lernejoj faras vastan propagandon en ĵurnaloj kaj Esperanto aperas en la nomaroj de instruataj lingvoj. Tia aperado de Esperanto-nomo estas aparte grava kaj propaganda, multe pli efika ol nuraj »propagandaj« artikoletoj. Laŭ listo, kiun faris »ŬRO (Centra Estraro Sindikata) centrejo por faka klerigo« aperis sciigoj pri kursoj, informoj pri Esperanto en la Labor-lernejoj, internacia lingvo por sindikatistoj kaj simile en 118 artikoletoj de tre diversaj ĵurnaloj de 4. 10. 1945 ĝis 16. 2. 1946. Aparte grava estas ankaŭ, ke en la preso de Centra Estraro Sindikata ŬRO aperas sciigoj pri Esperanto - instruado kaj pri aliaj faktoj de esperantista vivo precipe en ĝia Bulteno por la Laborlernejoj (*Věstník Škola práce*), kie aperis ĉeflingvaj artikoloj: E. en la Laborlernejoj (novembro 45), Kunlaboro de Labor-lernejo kun esperantistaj kluboj (januaro 46), Kongreso de ĉs. esperantistoj (februaro 46).

Ankaŭ occidentalistoj donas kelkajn vivsignojn en la ĉeĥa gazetaro. En *Národní osvobození* (6. I. 1946) ili, tre pligrandigante, raportas pri sia gazeto »Voce di Praha«, redaktata de Dr. K. Šťastný, kies unua numero aperis en januaro 1946 ciklostilita, kvazaŭ ĝi estus efektiva gazeto kaj ne modesta per propraj manoj farata bulteno, kies dua numero ĝis nun ne aperis. Simila ŝajnigo estis en Ĉin occidentallingva anoncforma danko pro gratuloj al meritplena 70-jara sinjoro Kašš kvazaŭ efektive multaj occidentalistoj dezirus legi lian dankon en occidental. La ilustrita familia semajngazeto *Beseda* enpresis en marto artikolon de Voženilek pri internacia lingvo, kiu informadis, pri volapük, esperanto, ido kaj occidental. Laŭ la aŭtoro occidental superas Esperanton pro sia naturisma karaktero, tial ĝi sola havas ŝancon esti akceptita kiel internacia lingvo. Nia sekretario J. Mařík klarigis perletere al la redakcio nian vidamieron de la problemo kaj la redakcio respondis per letero el 16. IV. dirante: Ni dankas Vin pro Via atentigo, kiun ni akceptis tre volonte. Ni ne volis kritiki Esperanton kaj ni publikigis simple en *Beseda* artikolon de unu el fakuloj, mem fakuloj ne estante.»

Tiaj artikoloj kaj agado de occidentalistoj efektive malutilas al publika aprobo de internacia lingvo ĝenerale. Kiam ekzemple fervora laboranto inĝ. J. Řebíček petis de redakcio de *Národní osvobození* enmeton de priesperantistaj sciigoj, li ricevis de la redaktoro afablan respondon rifuzantan, dirantan: »En ĵurnaloj estas pri tio mirigaj spertajoj. Tuj kiam ni dum la unua respubliko publikigis al iu similan artikolon, tuj ni ricevis de partianoj de aliaj internaciaj lingvoj simple malaman proteston. Eĉ la sfero de internacia lingvo estas plena de reciproka netoleremo, kiel la sfero de lingvoj kaj nacioj vivaj.« Tiuj vortoj de bonvola observanto meritas esti tre atentataj de ĉiuj aktivaj partianoj de lingvo internacia, sed precipe de niaj amikoj occidentalistaj.

(Daŭrigo). S. K.

Míla Kolář:

La vojo okcidenten.

Kiu en la nuna tempo vojaĝas trans la limon por kia ajn celo, tiu fariĝas politika observanto, ĉu li volas aŭ ne. Ja simpla mia vojaĝo el Praha Londonon en aeroplano, en la bele fluganta Dakota, kun fidinda kanada

garnizono, fariĝis fonto de politikaj pripensoj aŭ - ni diru - demonstraĉia leciono pri la principoj de moderna eksterlanda politiko. La epoko, en kiu flugaparato startas en Ruzyň*) por atingi post nur kvar horoj la flughavenon en Croydon, la epoko, en kiu oni povas matenmanĝi en Praha kaj tagmanĝi en Londono, tiu epoko postulas evidente de la mondpolitikaj direktantoj alian koncepton ol la bona malnova tempo de veturigistoj kun la limake malrapida iro de okazajoj, raportoj kaj progreso.

Bohemio kun sia limmontaro sub vi rapide malaperas en la direkto al Frankfurto, same la Rejno kun siaj detruitaj pontoj kaj la komplete disbatita Kolono sur Rejno; sude de Bruselo rapida turniĝo al la limo belga-franca, la marbordo inter Dieppe kaj Dunkirko, ludila vaporsipeto en La Kanalo, peco da ĝardeno de Albiono kaj la glitflugo super londonaj tegmentoj kaj kamentuboj sur la flughavenon... ĉio ĉi forrolas pli rapide ol homo povas konscii. Tio ĉi estas vere nenio por artifikaj politikaj tendencoj de iaj lokaj patriotismoj. Se sur la sojlo de tiu ĉi epoko la fizika kaj morala mortinto Chamberlain riskis diri, ke li nenion scias pri ia Ĉeĥoslovakio, li simple nur superis la famajn eldirojn de Ŝvejk**), kiajn tiu ĉi uzis dum siaj interparoloj kun sia loĝejmastrino, ŝmirante sian genuon per Opodeldok.

La Londonanoj neniam pardonos al Chamberlain, ke li ilin tiamaniere kompromitis, jam tial ne, ĉar Londono estas urbo internacia, tra kiu vagadas negroj, hindoj, ĉinoj, malajoj, mallonge dirite, nacioj de ĉiuj kontinentoj. Kaj Granda Britujo devas malgraŭ ĉiuj imperiaj konceptoj klopedeĝi, por ke ĝi faru internacian politikon de paco - de tiu paco, kiu sola estas la vera amiko de ĉiuj popoloj kun ĉiuj iliaj kuriozeco kaj problemoj.

Ke ankaŭ la vizito de ĉeĥoslovaka ĵurnalista delegitaro en Anglujo estis afero politika, pri tio atestis la karaktero kaj riĉa programo de ĝia restado. Kelkaj politike iom ruzetaj anglosaksaj ĵurnalistoj ne preterlasis la okazon por plendi, ke dum sia vizito en USSR ili senĉese devis moviĝi laŭ skemo, en akompano de ĉiaspecaj akompanantoj kaj interpretistoj, kaj ke ili preskaŭ ne havis okazon fari vizitojn laŭ propra plaĉo. Sed samtempe ili forĝesis aldoni, ke tiu ĉi formo ne estas drasta sovjeta metodo, sed kutima internacia elmonro de oficiala amika atento, ia universale akceptita oficiala klopodo por montri al karaj gastoj kiom eble plej multon. En Moskvo oni praktikas tion rilate anglojn, usonanojn kaj ĉeĥoslovakojn, ni en Praha agas tiel rilate al ĵurnalistoj sovetaĵaj aŭ jugoslavaj, en Londono oni praktikas tion eble rilate al ni. Kaj do estas tre malsprite, se iu en tiu ĉi oficiala amika fervoro serĉas la danĝeron, ke oni montras al li Potjemin-vilaĝojn. Tiu ĉi maniero, kiu havas en si iom pli grandajn postulojn de fizika peno, donis ekzemple al ni sufiĉan okazon, por ke ni povu paroli kun unuopuloj el ĉiuj klasoj sociaj kaj el ĉiuj rangoj de la loĝantaro pri kio ajn, kio interesis nin; ekz. al mi, kiu konas Anglujon antaŭmilitan, ebligis tiu ĉi metodo ne unu nstruan komparon kun la nuna aferstato. Cetero jam tio, kion oni montras al vi en tiu aŭ alia lando en tiu aŭ alia tempo, estas por atenta fremdulo la montrilo de sociala kaj politika atmosfero de la lando.

Elokventa politika gesto por Anglujo certe estas, ke la unua loko, kien nin niaj atentemaj akompanantoj, la oficistoj de la ministerio por informoj, kondukis, estis Westminster, la konstruaĵo de la brita parlamento.

